



# ESPERANTO NORMANDA BULTENO

unuiĝo de normandaj esperantistoj

Redaktas: Pierre QUILLAUD 16, rue Lt Vaisseau Paris  
76120 LE GRAND-QUEVILLY Tel. 35 69 66 09  
Abon-Kotizoj: 45 Frankoj. Union des Espérantistes de Normandie  
CCP 283 - 40 H ROUEN

## ESPERANTO KAJ EKONOMIA KRIZO



Ankaŭ Esperanto suferas pro ekonomia krizo. En ĉiuj landoj malkreskas aĉetpovo. Senlaboreco disvastiĝas; pensionoj malaltiĝas; salajroj stagnas aŭ regresas. Laboristoj timas maldungon kaj ŝparas monon (se ili povas) por la malbonaj tempoj kiam ili neniom enspezos. Emeritaj gepatroj helpas finance senlaborajn infanojn....Mono pli kaj pli mankas kaj pesimismo malfavorigas intereson al idealismaj aferoj.

Oni diras franclingve ke "*mono estas nervo de milito*". Se mono estas nepre necesa por militi, ĝi ankaŭ necesegas por aktivaj favore al niaj ideoj. Altaj politikaj instancoj kontraŭas Esperanton kaj ne helpas ĝin per subvencioj (escepte kelkaj urbestroj kiuj helpas lokajn grupojn). Esperanto daŭre bezonas reklamon (aŭ propagandon); Nur mono de esperantistoj mem ebligas tion.

Kion oni konstatas? Malpli da samideanoj aliĝas landajn kaj internaciajn asociojn; kelkaj "fororgesas" pagi jaran kotizon; multaj pagas nur reduktitajn kotizojn (por emeritoj, senlaboruloj, junuloj, ktp...). Aktivaj membroj postulas de estraranoj diversajn planojn por konigi kaj disvastigi la lingvon. Sed, kio estas realigebla sen mono?

Kulturaj aktivaĵoj suferas ankaŭ pro tio. Ni fieras montri al ne-esperantistoj belaspektajn revuojn eldonitajn en la tuta mondo: Monato, Heroldo, El Popola Ĉinio, Esperanto, Sennacieca Revuo, Literatura Foiro, ktp...Sed revuoj kaj gazetoj bezonas abonantojn por pludaŭri. Ĉu vi scias ke apero de El Popola Ĉinio estis necerta kiam abonantoj de eks-Sovetio ne plu povis pagi abononj?

Vi bone konsciis pri tio. Kiam aperos venonta normanda bulteno kun informoj pri kotizoj kaj abonoj, ni esperas ke vi povos subteni Esperanton kaj ties idealon.

Petro KIJO

\*\*\*\*\*



Ĵus reveninte hejmen, post partopreno en SAT-kongreso, mi deziras sciigi miajn impresojn ankoraŭ freŝajn pri kongreso kaj pri lando kie SAT nek povis, nek rajtis kunveni depost 70 jaroj.

Sankt-Peterburg, Petrograd, Leningrad kaj denove Sankt-Peterburg. La ĝenerala sekretario de SAT humure proponis, ke tiu urbego nomŝanĝema fariĝu dum unu semajno : *SAT-PETERBURGO*. Tia ĝi ja estis por la 240 partoprenintoj kiuj ĝuis SAT etoson dum kongresa semajno.

Dum aŭgusto 1926, okazis la sesa kongreso de SAT en Leningrado. Homoj kiuj travivis tiujn postrevoluciajn jarojn memoras kiel entuziasmiga estis tiu epoko por avangarduloj kaj por laboristaro ĝenerale. Leviĝis la espero por pli justa, pli harmonia, pli frateca socio.

Tiu entuziasmo eĥis kompreneble en SAT por kiu socialismo kaj esperantismo, internaciismo kaj sennacieco estis intime ligitaj. Tamen, jam ekĝermis la unuaj duboj kiuj kondukis E.Lanti,-kelkajn jarojn poste-, al verkado de broŝuro titolita: "*Ĉu socialismo konstruiĝas en Sovetio?*"

La eventoj kiuj okazis poste pravigis tiujn dubojn : la dezirata plej ideala, paradiza socio baldaŭ fariĝis inkuba !

Sovetiaj esperantistoj devis ĉesigi siajn poresperantajn agadojn. Multaj el ili estis persekutataj kaj mortigataj .

Sed post plej malluma nokto, denove aperis la suno: vintra suno kun malardaj radioj. Jaroj post jaroj, renaskiĝis esperantistaj grupoj sed SAT ankoraŭ longe restis rigardata kiel *malamika* asocio.

Pro tio, la kongreso en Sankt-Peterburgo estis simbola kaj signifoplena. Certe ni kunvenis en lando kie regas ankoraŭ ĥaoso. Certe mortis diktatoreco sed vera demokratio ne ankoraŭ ekzistas. Privilegiuloj tie fanfaronas; multaj el ili estas privilegiuloj de antaŭa reĝimo. Promenante, mi havis okazon vidi komunistan manifestacion: mil aŭ dumil homoj kun ruĝaj stândardoj; virino alte tenis portreton de...Stalin! Alian tagon, sur la sama loko, mi renkontis aliajn homojn kun aliaj stândardoj. Oni diris al mi ke ili estas monarkistoj !!!

Kiel kutime, en niaj kongresoj, ni havis plezuregon renkontiĝi kun gekamaradoj el tre diversaj landoj. Ĉiuj kontinentoj estis reprezentitaj, escepte de Afriko. Ĉeestis kamaradoj el Kanado, Usono, Sud-Ameriko, Japanio kaj Aŭstralio. Krom la rusa, la franclingva delegacio estis la plej multnombra.

Mi partoprenis en la antaŭkongreso kaj do havis pli da tempo por alkitimiĝi al cirila alfabeto kaj al rusa mono. Unu franko valoris mil rublojn; la kalkulo estis do tre simpla: sufiĉis forigi tri nulojn; tamen , -ĉu pro nekonscia

fenomeno?-, ŝajnas ke por multaj Francoj, estis pli malfacile elspezi 50.000 rublojn ol 50 frankojn!!! Multaj artikloj estas importitaj de Usono kaj de okcidentaj landoj kaj estas tre multekostaj por Rusoj.

Sankt-Peterburgo estas unu el la plej belaj urboj en la mondo. Ĝi estis harmonie konstruata sub regado de Tsaro Petro la Unua, -antaŭ 300 jaroj-, de centmiloj da kamparanoj devige translokitaj tien por estigi novan ĉefurbon de Rusio.

Ni havis okazon admiri monumentojn, palacojn, pontojn, preĝejojn kaj larĝajn harmoniajn avenuojn; ni povis ankaŭ gapvagi laŭlonge de larĝa Neva kaj multaj kanaloj. OKK organizis diversajn ekskursojn al ĉirkaŭaĵoj: Puŝkin (cara cilaĝo), Pavlovsk (alia cara rezidejo), Novgorod (antikva rusa urbo), Petergof (urbo de fontanoj), Viborg ĉe finna landlimo. Kongresintoj memoros longatempem admirindajn vizititajn lokojn; estas domaĝe ke pluva vetero ne ĉiam favoris ekskursantojn.

Kiam ni alvenis, atendis nin ĉe flughaveno, simpatiaj akceptantoj. Organizado de kongreso ne estis facila tasko por OKK-anoj. kiuj bone elturniĝis kaj kiom eble plej bone provis kontentigi "grumblantajn" kongresanojn.

Vesperaj distraj programoj estis altkvalitaj kvankam amatoraj. Ni havis plezuron aŭskulti ensemblon "Blua Ponto" kaj kantistojn de Esperanto-klubo "Amikaro". Ni aplaŭdis popolan ensemblon "Kumuŝki" de urbo Tihvin. Gratulinda estas grupo de infanoj kiuj ludis, deklamis kaj kantis. Estis por ni granda surprizo aŭdi kiel bele kantas Ludmila Titova, prezidantino de OKK

La OKK ne forgesis la socian karakteron de SAT kaj organizis viziton al uzino kiu produktas metalajn objektojn. Dum vizito al vartejo, kongresanoj renkontiĝis kun infanoj kaj edukistoj kiuj ludis Esperanto-koncerton.

La temo de la kongreso estis jena: "**La mondo sen bariloj de la naciaj antaŭjuĝoj**". Laborkunvenoj okazis 4 foje kaj ebligis demokratajn diskutojn. Raporto de Plenum-Komitato estis aprobata. Protokolaron, Deklaron kaj Gvidrezolucion oni povos legi en organo "Sennaciulo".

Kelkaj negativaj punktoj:

- malmulta partoprenantaro dum laborkunsidoj
- manko da gejunuloj;
- malapero aŭ endormiĝo de kelkaj frakcioj. Kunvenis nur la komunista, la liberecana kaj la sennaciista
- tro multaj krokodilantoj!

Ni devas kompati du gekamaradojn kiuj travivis malagrablajn sanproblemojn:

- iu Kamaradino dum antaŭkongresa semajno devis restadi kelkajn tagojn en dormĉambro atendante veturigon al la hejmo pere de asekura kompanio.
- Nia kamarado Michel Audibert rompis al si kruran oston kaj restadis kelkajn tagojn en rusa hospitalo.

Ni deziras al ili bonan resaniĝon.

Lacaj ni estis revenante hejmen. Lacaj sed kontentaj pro viditaj belaĵoj, pro la interesaj diskutoj.

Pli lacaj ol ni estis sendube la membroj de Organiz-Kongres-Komitato; ili senĉese provis kontentigi nin kaj alfrontis neatenditajn malfacilaĵojn. Ni dankeme gratulu ilin.

Jam nun, ni planu viziti venontjaran 70an SAT kongreson kiu estiĝos en Aŭgsburgo (Bavario) !

Petro KIJO



*Tiun artikolon mi verkis por la bulteno "SAT-Amikaro"*

*Ĝi aperis en tiu gazeto kun gramatikaj kaj stilaj plibonigoj.*

*Do, kelkaj el vi legos ĝin duafoje sed multaj legantoj de "Normanda Bulteno" ne abonas "SAT-Amikaro"n; mi opinias ke tiuj impresoj pri SAT-Kongreso interesos ilin.*

@@@@@@@@@@@@@@@@@@@@@@@@@@@@@@@@@@@@@@@@@@@@@@@@@@@@@@@@@@@@

## **ESPERANTO-NORMANDIE**

L'Assemblée Générale d'Esperanto Normandie a eu lieu à Rouen le 24 Mars 1996. Vous avez pu en lire un bref compte-rendu dans le bulletin n°188 de Juin 96. Cette assemblée aurait du être suivie par une réunion du Comité Directeur(estraro).

Notre Président Pierre POTTIER a été victime d'un accident qui a nécessité son hospitalisation pendant plusieurs mois, ce qui a empêché notre réunion. Nous lui souhaitons un total rétablissement.

### ***Das Komitee Niedersachsen-Normandie***

#### ***Le Comité Basse Saxe-Normandie***

***La Komitato Malsupra Saksio-Normandio*** : Tiu komitato celas starigi amikecajn ligojn inter Germanoj de Malsupra Saksio (regiono de Hanovro) kaj Francoj de Normandio.

De 30 jaroj, ĝi kontribuis al realigo de pli ol 70 urboĝemeligoj.

Pere de tiu komitato, Esperantistoj de Malsupra Saksio ekrilatis kun ni. Ili deziras personajn kontaktojn kaj pravi al la publiko la utilon de Esperanto.

La Prezidantino de la sekcio "Malsupra Saksio" de Germana Esperanto Asocio invitis nin partopreni la jaran kunvenon de ties asocio (kun senkosta gastigo por 2 personoj). Bedaŭrinde, pro someraj feriaj forestoj, ni devis rezigni ŝian inviton.

Dum venonta kunveno de nia estraro, ni devos pridiskuti la realigon de estontaj rilatoj kaj renkontiĝoj kun niaj germanaj geamikoj.

## LA KASISTO:

**COTISATIONS 1996:** Nous avons reçu pour l'année en cours les abonnements-cotisations de : Gesinorj Angenault, Bataille, Berlot, Bessière, Bettancourt L et M, Boucher, Canu, Caron, Chevallier, Couture, Defrance, Domingo, Duflo, Duhamel, Feret A et S, Gibaux, Giordano, Guérout, Guerre, Haulard, Helbert, Huet, Jean, Jourdain D et ML, Jouvin, Langanay, Lebrun, Lecouvreur, Legros, Lemarchand, Loisel, Mary, Masseron, Maurouard, Mendes, Millet, Moyon, Noel, Ordonaud, Peltier, Pottier, Poupinet, Quillaud, Rauch, Robiolle, Roblin, Rolland, Séry J et S, Tailpied, Tanguy, Teani, Touileb, Varneville, Vauquelin, Zilliox

*Votre nom ne figure pas dans cette liste?*

--Parce que vous êtes un nouvel espérantiste, ou un ami de l'Espéranto, nous vous l'adressons gratuitement

--parce que vous avez oublié de régler votre cotisation; dans ce cas n'attendez plus; nous attendons votre chèque

--parce

que notre bulletin ne vous intéresse pas; dans ce cas ayez la gentillesse de nous prévenir (avec vos raisons si possible) nous ne vous l'enverrons plus; cela nous évitera des frais inutiles.



## NIAJ KLUBOJ:

### GRAND COURONNE:

Sabate 21an de Septembro okazis "Journée des Associations". Esperanto estas fako de Jogo asocio. Ni starigis budon: grandaj afiŝoj atentigis pri Esperanto. Ni ekspoziciis multajn esperantlingvajn revuojn kaj gazetojn kaj ni disdonis propagandajn broŝuretojn kaj flugfoliojn. Vizitantoj interesiĝis pri nia agado.

### GRAND QUEVILLY:

Arnaud Quillaud kiu loĝas en pariza regiono akceptis sian korespondanton de "Pasporta Servo"; li nomiĝas Mussa kaj venas de Tanzanio. Ili pasigis 3 tagojn en Grand Quevilly kaj ankaŭ vizitis Rouen kaj marbordon. Tiu juna Tanzaniano estis jam partopreninta staĝojn en Grésillon kaj La Chaud de Fonds; antaŭ reveni Afrikon, li partoprenis diversajn esperantistajn aranĝojn en Danio, Norvegio ktp...

Semajnaj kunvenoj de la grupo okazos kiel kutime ĉiŝaŭde de 17h45 ĝis 19h15 ekde la 10a de Oktobro en "Salle n°2 de Centre Socio-culturel, avenue Kennedy.

### FECAMP:

La kvara Ekspozici-Salono de Radiokomunikado okazos la 26an kaj 27an de Oktobro en teatro Maurice Sadorge en Fécamp.

Mouloud kaj Taous deĵoros ĉe esperantista budo kaj tie propagandos por nia lingvo kiel ili jam faris sukcese antaŭ 2 jaroj.

Por helpi kaj kuraĝigi ilin, venu viziti tiun ekspozicion. Enirprezo estos 10 frankoj

*Espérantistes du Havre, d'Yvetôt, de Rouen et d'ailleurs...venez aider nos amis de Fécamp à constituer un groupe local.*

## HEROUVILLE:

En Junio, nia grupo gastigis Ruson: Mikaelo Bronŝtein loĝanta en Tihvin, ĝemela urbo de Herouville. Ni konas lin jam de 1991! Li venis kadre de oficiale invitita delegacio de entreprenistoj de Tihvin. Jam de kelkaj jaroj li estas elektita Ĝenerala Direktoro de uzino "GALANT". Tiu uzino produktas plastikaĵojn (kombilojn, sitelojn, tubojn...)

Dum lia restado, li vizitis diversajn uzinojn kaj plastikan instituton starantan en Normandio. Sed la plej interesa kontakto okazis pere de Esperanto! Antaŭ lia alveno ni rilatigis lin kun firmao en Alzacio kies Direktoro, Sro Basso, aliĝas al T.A.K.E. (Tutmonda Asocio de Konstruistoj Esperantistaj) ĉefe agema en tiu orienta regiono. Sro Basso proponis produkti plastikerojn por betonkonstruado. La urbestro de Hérouville pagis la vojaĝon (per aŭtomobilo kun ŝoforo) de Mikaelo al Alzacio kaj reen. Intertraktado inter ambaŭ uzinoj daŭre okazas en septembro por akordiĝi pri prezoj kaj transportrimedoj. La urbestro de Hérouville aparte atentis pri evoluo de la afero ĉar nur Mikaelo sukcesis havi tiel interesan rilaton kun franca uzino, la aliaj delegacianoj ne irinte pli profunden ol nura vizito de uzinoj.

Iun vesperon, li prelegis en Hérouville antaŭ 30 personoj inter kiuj ĉeestis 2 urbokonsilantoj, pri evoluo de sia uzino de la komenco en 1936 ĝis nun. Imagu kiajn ŝanĝojn! Ili nun baraktas en „por ni-, ne imageblaj problemoj. Sed Mikaelo estas tre agema, vigla direktoro, tiel sperta en estrado de uzino kiel en produktado de kanzonoj, tradukpoemoj kaj romanoj en Esperanto! Raportis ĵurnalisto en "Ouest-France".

Dum ferioj, 12 personoj el la grupo partoprenis kurson apud Bajkal lago en Hungario, aliaj la Universalan Kongreson de UEA en Prago. Kvar estas vojaĝontaj en septembro al Brita cspcranta aranĝo.

Entute, bonfarto por la grupo kaj aliaj projektoj por jaro 96/97 !

Yves NICOLAS

\*\*\*\*\*

## LA UNIVERSALA KONGRESO EN PRAGO

Tiu 81a UK en Prago estis por mi bona okazo revidi tiun landon kiun mi vizitintis 27 jarojn antaŭe, dum la fama "Praga Printempo", tuj antaŭ la alveno de la tankoj de la sovetaj amikoj.

Multaj ŝanĝoj okazis kiel ĉiuj scias. La unua ŝanĝo estis ke Prago ne plu estas ĉefurbo de Ĉeĥoslovakio sed de Ĉeĥio. La dua ŝanĝo por la veturanto estas ke oni apenaŭ kontroilas la pasporton ĉe la landlimo kaj oni ne plu postulis de ia turistoj ke ili elspezu difinitan monsumon ĉiutage... Enirante Ĉeĥion, mi ne plu havis tiun strangan senton esti sur alia planedo, kiun mi sentis tiam.

Estis precipe bona okazo por revidi nian malnovan amikon, Doktoron Josef Hradil, ĉiam agema por la movado, kiu akceptis nin en sia pensiono "Espero", kreita en bieno de siaj gepatroj, konfiskita de la tiamaj aŭtoritatoj, kaj kiu estis restituita al li post la disfalo de la komunista sistemo. Tiu pensiono troviĝas meze de la "ĉeĥa paradizo", bela regiono norde de Prago, proksime de la pola landlimo. (Mi profitas la okazon por fari senpagan reklamon: mi rekomendas ĝin al tiuj, grupoj aŭ unuopuloj, kiuj dezirus pasigi kelkan tempn en tiu pitoreska regiono. La kondiĉoj estas ege favoraj.)

Sed la kongreso atendis nin kaj post vizito de kelkaj historiaj kasteloj, ni forlasis la pensionon por ĉeesti la kongreson en Prago. Vi eble jam legis en niaj gazetoj (Esperanto, Eventoj, Heroldo ktp...) pli bone ol mi povus raporti, ĉion kio okazis kadre de tiu kongreso: mi devas diri 1<sup>o</sup>-ke la Kongresejo (Palaco de Kulturo, meze de urbo) estis perfekte taŭga. 2<sup>o</sup>-ke ĝi estis perfekte organizita de la ĉeĥaj gesamideanoj malgraŭ la alta nombro de kongresanoj (ĉirkaŭ 3000). Ĉio laŭ mi, funkciis glate. Pluraj ambasadoroj (Argentinio, Italio, Koreio, Litovio, Slovenio kaj Ukrainio) ĉeestis la inaŭguron kaj la kongreson salutis perletere la Prezidento de la Ĉeĥa Respubliko Vaclav Havel, la Ĝenerala Sekretario de UN Boutros-Ghali, la Ĝenerala Sekretario de UNESKO F.Mayor, kaj la ĉefepiskopo de Prago Kardinalo Miloslav Vlk. Ankoraŭfoje okazis tiu miraklo de la interkompreniĝo tiom impresa kiam oni travivas ĝin por la unua fojo.

Mi ne intencas fari detalan raporton pri tiu kongreso. Mi mencias nur unu novaĵon: la faka kunveno de la "internet"-uzantoj (aŭ "surfantoj", se vi permesas tiun anglismaĵon). Por tiuj kiuj ne estas ankoraŭ spertintaj tiun novan komunikrimedon, mi povas diri ke la esperantistoj estas jam multnombraj en tutmonda reto. La elektronika poŝto estas kompare al la "helika poŝto" kiel la vojaĝo per "Concorde" kompare al la piedirado. La esperantistoj ne povas ne interesiĝi al tiu moderna komunikilo.

Ni estis scivolemaj revidi Pragon: ni memoris nigretajn domojn, malgajajn, senesperajn vizaĝojn, ian ĝeneralan tristecon... tempojn kiuj aperas nun kiel malbona revo. Ni ne imagis ke tiu urbo estis tiom bela, harmonia, plena da historio, historio ligita al tiu de Mezeŭropo. La vidindaĵoj estas multnombraj sed precipe menciindaj estas la Palaco, la malnova juda tombejo, la belegaj domfasadoj, la barokaj preĝejoj ktp... La nombro da turistoj el ĉie atestas pri la famo de tiu urbo.

Oni ne povas paroli pri Ĉeĥio kaj Prago sen ankaŭ mencii la bohemajn kristalaĵojn kies vendejoj sekvas la itinerojn de la turistoj... Sed la tempo rehejmiĝi alvenintis. (Ĉiamaniere la kelkaj paĝoj de nia revueto ne sufiĉus por detale priskribi ĉiujn Pragajn vidindaĵojn) kaj ni transveturis la limon kun la firma intenco reveni al Prago antaŭ la proksima UK en tiu-ĉi urbo (la lasta UK en Prago okazis en 1921!...).



Dro Pierre BERLOT  
Mont Saint Aignan (76)

## PACO EN ŜTORMO

De Marc Rohrbach. Unua eldonaĵo franclingva en 1933. Reeldonita en 1976  
Traduko en Esperanto kaj eldonita de Literatura Foiro en 1994.

*Por konduki niajn pensojn kaj niajn agojn al vivo pli bona :*

“...La mondo senĉese dividiĝas; limoj kaj kurtenoj el oro, fero aŭ tero apartigas popolojn kaj naciojn. Klasoj, profitoj kaj ideologioj ne plu organizas la homan vivon laŭ rilatoj validaj, sed malproksimigas la homojn unuj de la aliaj. La ekonomiaj kaj politikaj reguloj, sur kiuj oni iam kredis, ke oni povos sin apogi, iĝas senefikaj.

Antaŭ tiu fakto kreskas maltrankvilo, ĉar ĉiu kulpigas sian najbaron ke li minacis lin, dum la homoj de nun vivas sur tero komuna por ĉiuj. La venonta konkero- konceptebla same paca, kiel la astronomia scienco- estos tiu de la universo, kaj ne plu de kontinentaj areoj, ĉar senĉese konfirmitaj, ke ĉi lastaj estas komuna havaĵo malgraŭ ĉiuj depostuloj. (1)

Du grandaj fluoj, unu celanta disigon kaj la alia kunigon, disvolvas siajn energiojn inter 2 polusoj estrantaj la homaran organizadon. Tiu lasta termino ĉi tie uziga laŭ la funkcia signifo de io viva, en kiu la histoj diferenciĝas por konsistigi organojn interdependajn ĝis grado tia, ke senfortiĝo de unu inter ili estas ruino por ĉiuj (2). Samtempe, ĉiulande, en ĉiuj naturaj aŭ artefaritaj subdividoj de la homa vivo, grupoj formiĝas kaj homoj vekiĝas, (3) kiuj estas kvazaŭ la nerva sistemo de la mondo. Por formiĝi, la surtera unueco ne bezonas unuformecon. (4)

Oni tiel ĉeestas metamorfozon, kiu ĉiam pli akceliĝas kaj estigos novan mondon dum la senutilaĵoj de la malnova estos forlasitaj kaj sekiĝos, inertaj en sia propra senutileco.

La granda krizo de tiu jarcento, kvankam senpera konsekvenco de egoismaj misvagoj, samtempe preparas la homojn eliri el ilia nefaro. Necesas ke la homoj estu serioze tuŝitaj de profunda mutacio. La egoismaj sintenoj fariĝos abomenaj por ĉiuj ĉar ili ne plu povos ion alporti al la homoj, krom tio kio ŝajnos liberigo por unuj kaj kataklismo por aliaj.

Ja ĝuste dum tiu mutacio, ekos la nova ciklo. Ĝi vivis en la spiritoj, ĝi fariĝas materia realo. Konsciaj homoj ĉie aperos; ilia potenco estos krea, ne batalema, kaj la saĝo universala loĝos en ili.”

- (1) Pro tio, militaj konfliktoj aspektas al ni arkaikaj kaj vojoj al dialogo ĉiam rekonstruendaj
- (2) La akcidento de Ĉernobil, ekzemple
- (3) La esperantistaj asocioj estas es sia fako la instrumento dank'al kiu disvastiĝas la ideo de internacia lingvo
- (4) Tial, unu patrina lingvo por ĉiu, fremdaj lingvoj por kiuj bezonas ilin, unu tutmonda lingvo por ĉiuj

La titolo kaj subaj notoj estas faritaj de Mouloud Touileb

*Nous avons hésité à insérer ce texte dans notre bulletin en raison de sa difficulté et en raison du fait que nous évitons la parution d'articles dont le caractère philosophique, politique ou religieux pourrait provoquer des contestations*

*Le Rédacteur*

@@@@@@@@@@@@@@@@@@@@@@@@@@@@@@@@@@@@@@@@@@@@@@@@@@@@@@@@@@@@

*Nun ni ridetu:* Respondo de hotelestro al kiu oni demandis ĉu li akceptas hundon en sia hotelo:

“Sro, depost 30 jaroj mi estras tiun hotelon. Neniam hundo ŝtelis cindrujon aŭ bruligis liitukojn per cigaredo. Mi neniam devis alvoki policon pro ebria hundo aŭ senpaga foriro.

Tial, mi bonvolas plezure akcepti hundojn.

P.S. : Se via hundo deziras tion, vi povos kunveni kun li!...” el Mickey Parade (tradukis M.T.)